Perantoj. Por ĝisdata listo de perantoj bonvolu vidi aktualan numeron de "Studento" aŭ petu ĉe la Sek.-kasisto.

ESPERANTA ŜAK-LIGO INTERNACIA

(Fondita 1958)

Celo: EŜLI celas grupigi ĉiujn ŝakistojn, kiuj scipovas la Internacian Lingvon Esperanto kaj ebligi al ili amikajn ŝakajn rilatojn, propagandi la Internacian Lingvon Esperanto inter ŝakistoj en la tuta mondo. Se la cirkonstancoj tion permesos, EŜLI eldonados ŝakan revuon en Esperanto.

Membreco: Aktiva membro de EŜLI rajtas esti ĉiu ŝakisto, kiu scipovas la Internacian Lingvon Esperanto. Ĝis oktobro 1960 EŜLI registris pli ol 500 adresojn el 37 landoj.

Kotizo: Jara kotizo estas 1 usona dolaro (aŭ egalvaloro).

Estraro: Prezidanto: Torsten Lindberg, Prässebo, Svedujo. Vicprezidanto kaj sekretario: D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakio. Kasisto kaj turnirgvidanto: Jean Duthilleul, 7 rue Commandant Carlhan, Briançon (Hautes Alpes), Francujo. Estrarano: Helmut Rössler, Klosterstr. 177b, Edenkoben (22b), Rheinland-Pfalz, Germana federacia respubliko.

Ŝakaj rubrikoj: EŜLI prizorgas ŝakajn rubrikojn en revuoj Esperanto kaj Nuntempa Bulgario. En rubrikoj aperas informoj pri aktiveco de EŜLI kaj ek de 1961 problemaj konkursoj.

Korespondturniroj: EŜLI organizas korespondturnirojn en grupoj po 7 ŝakistoj (ĉiam el 6-7 diversaj landoj). Ĝis oktobro 1960 funkciis 11 grupoj. Aliĝkotizo estas 1 dolaro — validanta por du grupoj en la jaro. Aliĝojn akceptas la turnirgvidanto (vidu adreson). EŜLI interkonsentis kun ICCF (Internacia korespondŝaka federacio), ke la kvalifikado, atingita en EŜLI-turniroj, validos ankaŭ en turniroj de ICCF (kaj inverse).

Kunvenoj de EŜLI-anoj: Jam ek de jaro 1957 kunvenas ŝakistoj-esperantistoj en kadro de ĉiujara Universala kongreso. Dum ĉi tiuj kunvenoj oni priparolas la organizaĵajn aferojn kaj ankaŭ ŝakludas. Oni kontaktas eĉ kun lokaj ŝakistoj — en Marseille 1957 okazis kunveno kun lokaj ŝakistoj en ilia klubejo.

Historio de esp. ŝaka organizaĵo. Laŭ diversaj informoj kaj dokumentoj EŜLI ne estas la unua esp. ŝaka organizaĵo. Jam en 1907 ekzistis "Societo de Esperantistaj Ŝak-

ludantoj", kiu eĉ zorgis pri ŝakista kunveno dum UK en Dresden 1908. EŝLI nun penas prilabori historion de esp. ŝaka vivo kaj petas ĉiujn, kiuj scias ion ajn pri ĝi, ke ili sciigu tion al la sekretario.

Adreso : D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakio.

TUTMONDA ESPERANTISTA JURNALISTA ASOCIO (T.E.J.A.)

Celoj : TEJA estas neŭtrala profesia organizaĵo. En ĝi rajtas membri ĉiuj ĵurnalistoj, korespondantoj, publicistoj esperantistoj, sendepende de iliaj nacieco, raso, politikaj kaj religiaj konvinkoj kaj tendencoj. La Tejanoj zorgas pri la disvastigo de Esperanto tra la mondo pere de gazetoj, revuoj, k.t.p., kaj tra la ĵurnalistoj mem. Krome okazas komuna kunlaboro en la medio de la ĵurnalistoj per interŝanĝservo kiu pruvas al la publiko la utilon de Esperanto kiel internacia laborlingvo.

Membroj : Laŭ la Statutoj TEJA havas du membrokategoriojn, kiuj estas :

A) profesiaj ĵurnalistoj kaj redaktoroj, kiuj sin vivtenas nur per sia ĵurnalista laboro;

B) kromprofesiaj ĵurnalistoj, kiuj havas alian profesion, sed de tempo al tempo aŭ regule verkas artikolojn esperantajn aŭ neesperantajn;

samideanoj, kiuj kromprofesie redaktas Esperantogazeton, k.s.; verkistoj.

Kotizo : 1 Usona dolaro jare, aŭ 14 steloj, aŭ 10 internaciaj respondkuponoj, aŭ egalvaloro en nacia valuto, pagendaj al Sekretario-Kasisto aŭ al la Redaktoro, laŭ la eblecoj.

Oficiala organo : "Internacia Ĵurnalista" estas oficiala organo de la Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio, eldonita en Sofia (Bulgario), kiun ĉiuj membroj rajtas ricevi.

Jarkunveno : Tio okazas ĉiujare dum la laboroj de la Universala Kongreso.

La Estraro : Prezidanto - Olav Thormodsen, Boĝ 132, Haugesund (Norvegujo); Vicprezidanto - Niilo Kavenius, Niklasengatu 10/14, Turku 9 (Finnlando); Sekretario-Kasisto - D-ro Dino Fabris, Borgo Bassano 5, Citadella-Padova (Italujo); Redaktoro - Ivan Keremidĉiev Esperov, bulv. Hristo Botev 98, Sofia 2 (Bulgario).

LA UNIVERSALA LIGO

Centra Oficejo : Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando

Tel : 556677; poŝtĉekkonto : 408826.

La Universala Ligo fondiĝis en Hago, la 14an de Aprilo 1942, je la 25a datreveno de la morto de la granda pacapostolo, D-ro L. L. Zamenhof.

La celo de la U.L. estas ne nur propagandi la ideon de Mondfederacio kun Mondregistaro, sed ankaŭ edukadi la popolojn al la mondevitaneco.

La U.L. volas labori por mondo, al kiu ĉiuj homoj sopiras, mondo en kiu ĉiuj nacioj, rasoj kaj religioj havos la samajn rajtojn, kun internacia polica armeo, kun unu komuna lingvo, sen limaj baroj.

La U.L. uzas Esperanton kiel sian oficialan lingvon, eldonas monatan organon (**La Praktiko**) kiel interligilon inter la membroj kaj enkondukis universalan monsystemon por plifaciligi la monalkuladon internacie. La nomo de la monunuco estas "stelo"; ĝia valoro estas trovebla en ĉi tiu jarlibro en speciala tabelo. En junio 1960 aperis ankaŭ metalaj moneroj, fabrikitaj por Universala Ligo de la Nederlanda Ŝtata Monfarejo en Utreĥto. Estas 3 moneroj en la valoro de respektive unu, kvin kaj dek steloj. La dekstela monero portas la bildon de D-ro Zamenhof. Krom la simbola signifo de la moneroj ili havas praktikan utilon dum internaciaj kongresoj kaj vojaĝoj.

Membroj povas esti ĉiuj, kiuj skribe deklaras aprobi la celon de la Ligo, alportante laŭvolan nombron da simbolaj brikoj. La aliĝo kaj la kontribuo okazas unufoje por la tuta vivo. Pluaj brikoj estas laŭvole kiam ajn aldoneblaj. La prezo de unu briko estas 1 stelo.

Fundamentaj Membroj estas tiuj kiuj donacas minimume 500 brikojn. Ĉi tiuj membroj ne ricevas la gazeton.

Aktivaj Membroj estas tiuj Liganoj kiuj krom la donaco de unu aŭ pluraj brikoj pagas ankaŭ kotizon de 32 steloj jare. Ili ricevas la periodajn eldonaĵojn de la Ligo. La aktiva membreco estas kalkulata ĉiam por kompleta kalendara jaro. "Aktivaj membroj sen gazeto" pagas jare 4 stelojn; ili ne ricevas la organon.

Oni povas fariĝi Dumviva Aktiva Membro pagante kotizon de 700 steloj, unufoje por la tuta vivo.

Ili ricevas la gazeton dum sia tuta vivo, sen plua pago.
La U.L. havas nun 12.800 membrojn.
La Estraro de la Universala Ligo :

Prezidanto : Prof. D-ro Edmond Privat, Neuchâtel, Svisujo.

Vic.-prez. : S-ino Julia Isbrucker, Den Haag, Nederlando.

Sekretario : Andreo Cseh, Den Haag, Nederlando.

Vic.-sek. : F-ino M. H. Vermaas, Rotterdam, Nederlando.

Kasisto : Inĝ. H. E. L. Voitus van Hamme, Den Haag, Nederlando.

Anoj : A. R. Campbell, Belfast, Nord-Irlando; D-ro Braz Cosenza, Rio de Janeiro, Brazilo; Delfi Dalmau, Barcelona, Hispanujo; H. J. Hendriksen, Bussum, Nederlando; André Labit, Lille, Francujo; Luigi Minnaja, Romo, Italujo; Oskar Svantesson, Göteborg, Svedujo.

La Universala Ligo estas aliĝinta membro de la Mond-Asocio de Mondfederalistoj, kies sidejo estas en Hago, Burgemeester Patijnlaan 49, Nederlando.

UNIVERSALA MEDICINA ESPERANTO-ASOCIO

(Antaŭe : Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio)

Celoj : 1. Disvastigi Esperanton inter medicinistoj; 2. popularigi ĝin en fakaj rondoj; 3. enkonduki ĝin en medicinajn revuojn kiel lingvon de resumoj de fakaj artikoloj; 4. eldonadi la aktualan bibliografion de fakaj artikoloj; 5. organizadi pere de Esperanto-Asocioj en unuopaj landoj la reciprokajn porsciencajn interŝanĝojn de medicinistoj; 6. organizadi la vizitadojn al Medicinaj Institutioj en diversaj landoj.

Membreco : Al UMEA povas aliĝi ĉiuj kuracistoj, farmaciistoj, bestkuracistoj, dentistoj, flegistoj kaj membroj de ĉiuj medicinrilatantaj profesioj kaj studentoj de supre nomitaj fakoj.

Kotizo : 2 Usonaj dolaroj jare aŭ egalvaloro, pagendaj al la kasisto de la Asocio aŭ al la landaj reprezentantoj. En tiu-ĉi sumo estas jam la abonkotizo al la oficiala organo "Medicina Revuo".

Oficiala organo : "Medicina Revuo" estas eldonata en

Japanujo kiel duonjara revuo sub la redaktado de Prof. D-ro Masao Suzuki en Tiba, 1-a Fiziologia Instituto de Tiba Universitato. Dezirinde estas ke la medicinistoj el ĉiuj landoj sendadu artikolojn kaj sciigojn taŭgajn por presigo en tiu faka revuo.

Estraro : Prezidanto : Prof. D-ro Hideo Yagi, Okayama, 76 Kawaramachi, Japanujo; Vic-Prezidanto : D-ro Rudolf Klimek, Krakovo, str. Braterska 18, Pollando; Sekretariino : D-ro Maria Jarnuszkiewicz, Krakovo, str. Mazowiecka 69, Pollando.

Kasisto : D-ro Georgi Barasi, London N 2, 45 Twyford Avenue, Britujo.

Komitatanoj : Redaktoro de "Medicina Revuo" Prof. D-ro Masao Suzuki, Tiba 1-a Fiziologia Instituto de Tiba Universitato, Medicina Fakultato, Japanujo.

Gvidanto de "Medicina Terminologia Centro" : D-ro Andreo Albault, 8, Avenue Etienne Bilières, Toulouse, Francujo.

Medicina Terminologia Centro, gvidata de D-ro A. Albault, prilaboras la novan ampleksan Esperantan medicinan vortaron. Ĝi servas ankaŭ kiel informa centro por kolegoj, kiuj publikante Esperantajn resumojn aŭ originalaĵojn, frontas terminologiajn problemojn. Post kiam la terminologio estos unueca, la MTC eldonados aktualan bibliografion de fakaj artikoloj kaj verkoj en ĉiuj landoj por ĉiu specialeco aparte.

Sekcio Sociale Sanitara, gvidata de Vic-prezidanto de ĉeĥoslovakaj invalidoj S-ro Josef Ambrož, Brno-Židenice, str. Špačková 3. Ĉeĥoslovakio, celas kunlabori kun la socialaj organizaĵoj de la unuopaj landoj por plibonigi la sanstaton de laborantoj kaj la vivkondiĉojn de invalidoj. Ĝi havas kontaktojn kun franca, jugoslava, soveta, hispana kaj pola organizaĵoj de invalidoj.

Sekretariejo : Dr Maria Jarnuszkiewicz, Krakovo, str. Mazowiecka 69, Pollando.

Kunvenoj : okazas ĉiujare dum la Universala Kongreso.

Landaj reprezentantoj : Argentino : D-ro P. A. Tesone Viamonte 2388, Buenos Aires; Belgujo : D-ro Pol Denoël, 20 Rue Viktor Raskin, Liège; Brazilo : Benjamin G. Cemozato, dentkuracisto, Rua Fernando Machado 929, Porto Alegre (Rio Grande do Sul); Britujo : D-ro George

Barasi, 45 Twyford Avenue, London N 2; Bulgarujo : D-ro Stojan Moraresku, Bojanska Reka 10, Sofio; Ĉeĥoslovakio : D-ro Josef Reiser, Nádražni 34, Plzeň; Ĉinujo : D-ro Te Kang, Kao-chow Lu 23/148, Ŝanhaj; Finnlando : D-ro L. I. Lappi, Outokumpu Oy; Francujo : D-ro J. Boulogne, Route des Alpes, Aix en Provence (B du Rhône); Germanujo : D-ro C. Renken, Auf den Häfen 26/27, Bremen; Hispanujo : D-ro Tudela Flores, Ruzata 45, Valencia; Hungarlando : D-ro Koloman Kalocsay, Budapest 4, P.F. 147; Italujo : D-ro Redenti Luciano, asistento ĉe la "Istituto di Medicine Legale", Parma; Japanujo : D-ro Hideo Shinoda Yamagata-shi, Kasumicho; Jugoslavio : D-ro Vuk Jovanović, Mašlesina 8, Beograd-Zemun VIII; Pollando : D-rino Maria Jarnusz-kiewicz Krakovo str. Mazowiecka 69; Portugalujo : D-ro Ĉesar Anjo, Rua Alexandre Lobo 72/3 dt. Viseu (Beira Alta); Rumanujo : D-ro Julian Popu, Cluj, Casuta postala Nr 75; Sovetunio : D-ro Eugenio Salnikov, B. Ordinka 56, kv 4, Moskva 95; Usono : D-ro John B. Rushing, 8307 Glencrest, Houston 17 (Texas).

VETERANA ESPERANTISTA KLUBO

1. **La Celo.** Honorigo de vivantaj fruĵaraj batalintoj, kiuj restas fidelaj al nia idealo.
2. **Membraro.** Esperantistoj estiĝas "Veteranoj" post kvardekjara scipovo de Esperanto, kaj "Jubileanoj" post kvindekjara scipovo. La plej malnova membro titoliĝas "Dojeno". Nun estas registritaj 430 Jubileanoj kaj 170 Veteranoj, inter ili la plimulto de Akademianoj kaj 20 Pioniroj el la pasinta jarcento (vidu liston en tiu ĉi J1.)
3. **Kotizo.** Anoj pagas neniun kotizon.
4. **Registro.** De tempo al tempo estas eldonata adreslisto, kaj por registriĝi en ĝi interesatoj estas petataj komuniki al la sekretario Titolon, Nomon, Adreson, Naskiĝjaron, jaron de esperantistiĝo kaj vivokuron kun foto, kaj pagi unu int. resp. kuponon por registriĝo. La nomlisto estas aĉetebla po 3 resp. kup. kaj V.E.K.-insigno po 3 resp. kup. Afranko petata.
5. **Organo.** "Informilo" eldonata de la Esperanto-Muzeo en Wien.

6. **Jarkunveno.** Tio okazas ĉe la Universala Kongreso. Prezidas la plej malnova ĉeestanta membro.
7. **Estraro.**
 - a. La Dojeno.
 - b. La Fondinto kaj Sekretario : Maurice Lewin, 33 Kingscroft Ave., Dunstable, Britujo.
 - c. La Redaktoro de "Informilo".
 - d. La Prezidinto de la pasinta jarkunveno.

ĈIU ESPERANTISTO INDIVIDUA MEMBRO DE U.E.A.

LA ORGANIZAĴO, KIU ATINGIS GRAVAN
REZOLUCION DE UNESKO EN 1954
LA ORGANIZAĴO, KIU INFLUIS KE
UNESKO CELEBRU D-RON ZAMENHOF
KIEL GRANDAN PERSONECON
LA ORGANIZAĴO, KIU ESTAS KANDI-
DATO POR LA NOBEL-PREMIO 1961 POR
LA PACO

VARBU VIAJN AMIKOJN !!

Neneŭtralaj organizoj kunlaborantaj

BUDHANA LIGO ESPERANTISTA

(Fondita en 1925)

Celo. Kunligi en interfrata rondo la budhanajn esperantistojn kaj ĉiujn bonvolemajn homojn, kiuj inklinas al la instruo de la Budho laŭ religia, filozofia aŭ etika vidpunkto por helpi al tutmonda paco.

Estraro.

Prezidanto : Swami Anurudha, ĉe Svargashram, Rishikesh, U.P., Himalaya, Hindujo.

Vicprezidanto : Ven. Zenkei Sibajama (Japanujo).

Anoj : Ven. C. Njanasatta Thero (Cejlono). Ven. Sanchi Asano (Japanujo). S-ro Rihej Nomura (Japanujo). S-ro Jean Ribillard (Polinezio).

Organo. La trimonata revuo "La Budha Lumo" estas alterne eldonata en Japanujo kaj Eŭropo.

Jarkotizo : ok steloj.

Pagojn oni sendu al la reprezentanto en sia mondparto.

Reprezentantoj.

Por Hindujo : La Prezidanto.

Por Japanujo : Ven. Sanchi Asano, Kuchisubo, Omishima-chô, Ochi-gun, (Ehime-ken), Japanujo.

Por Sudazio : Ven. C. Njanasatta Thero, Budhana Esperanto-Instituto, "Verda Ermitejo", Kolatenna, Bandarawela, Cejlono.

Por Sudameriko : S-ro Delio Pereira de Souza, "Rio Esperantista", Poŝtkesto 3677, Rio de Janeiro, Brazilo.

Por Eŭropo :

Benelukso : S-ro Marcel Bury, B.P. 89, Liège I, Belgujo.

Britujo : S-ro H. Scarle, 16 Fore St. Bodmin, (Cornwall).

Centra Eŭropo : S-ro F. Moravec, Twedterholz 15, Flensburg-Mürwik, Germanujo.

Orienta Eŭropo : S-ro Wladislaw Misiewicz, Gwardii Ludowej 12/23, Radom, Pollando.

Skandinavio : S-ro A. H. Tähtinen, Mölnalsvägen, Göteborg, Svedujo.

Suda Eŭropo : S-ino P. Bartiteaud, "Verda Stelo", Sainte Brigitte, Grasse, (A.M.), Francujo.

Kunvenoj. Okaze de ĉiu Universala Kongreso de Esperanto.

INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA

(Fondita en 1910)

I.K.U.E. estas internacia asocio de katolikaj esperantistoj. Ĝi celas per Esperanto servi al la katolikismo kaj la katolikaro.

Ĝi klopodas atingi tiun celon per : propagando, landaj ligoj, oficiala organo, enketoj, kongresoj kaj serva organo.

Ĝia oficiala organo estas **Espero Katolika**, monata revuo fondita en 1903. Sen kontraŭdiro ĉiu abonanto estas rekonata kiel membro de la Ligo.

La jarkotizo estas 6 gld., aŭ egalvaloro. Ek de 1.1.1961 dumonataj aldonoj po 8 pĝ. nome traduko de la Biblio. Libervola ekstra kotizo 1 gld.

La centra oficejo estas : "Espero Katolika", Dordrecht, Nederlando.

Redakcio : F-ino T. Durenkamp, Frederikstr. 2, Dordrecht, Nederlando.

Ĝis nun okazis 28 Internaciaj Kongresoj de Katolikaj Esperantistoj, ĉu aparte ĉu en la kadro de la Universalaj Kongresoj.

La ĝenerala estraro konsistas el du reprezentantoj de landoj, kie estas sufiĉe da membro-abonantoj. El tiuj personoj dekunu formas la ĉefestraron.

Prezidanto :

Sac. A. Beckers, paroĥestro, Kwaadmechelen (L), Belgujo.

Sekretario-kasisto :

F-ino T. Durenkamp, Frederikstraat 2, Dordrecht, Nederlando.

Membroj :

Mons-ro E. Violi, Via Dezza 48, Milano, Italujo;

S-ro N. W. Vigar, 28 Franklands Dr., Addlestone, Surrey, Britujo; Sac. L. Thalmaier, Spiegelgasse 211, Landshut, Bayern, Germanujo.

S-ro R. Colas, Rue de Mézières 13, Paris VI, Francujo;
D-ro Max Führung, Gentzgasse 137, Wien XVIII-110,
Aŭstrujo;

Sac. H. Paruzel, paroĥestro, Roza Wielka, pow. Walcz,
woj. Koszalin, Polujo;

S-ro d-ro W. Solzbacher, 6030 Broad Street, Washington
16 D.C. Usono;

Patro Lovro Kiš o.f.m. M. Tita 7, Karlovac, Jugoslavio.

S-ro A. Pedro Marqueta, Avda de Valencia 32, Zارا-
goza, Hispanujo;

Naciaj reprezentantoj : (poŝtkonto kaj kotizo) :

Argentino : S-ro W. Przewolka, Cas. de Correo 2914,
Buenos Aires.

Aŭstralio : S-ro V. J. Timmins, 73 Alexandria Parade,
Hornsby N.S.W. 15 ŝil.

Aŭstrujo : S-ro W. Mudrak, Beatrixgasse 19/9, Wien III-40,
p.k. 105.713, 40 ŝil.

Belgujo : S-ro H. Vermuyten, Albertstr. 16, Antwerpen
p.k. 207606, 80 frs.

Brazila Resp. : B. E. L., Praça da República 54, 1^o,
Rio de Janeiro. Kanoniko Is. Lagares, C. Postal 34,
Uberaba, M.G.

Brita Imperio : S-ro N. W. Vigar, 28 Franklands Drive,
Addlestone, Surrey, Anglujo, 12 ŝil.

Francujo : S-ro Pierre Muffang, 14bis Avenue Galois,
Bourg-la Reine (Seine) p.k. Paris 224-82, 8,25 NF.

Germanujo : S-ro Hans Stahl, Pestalozzistr. 4/1, (13a)
Weiden (Oberpf.) p.k. Nürnberg 634.33, 6,75 DM.

Hispanujo : S-ro Franc. Tur Riera, C. San Carlos 6, IBIZA
(Balears), 95 pes.

Irlando : S-ro Lorcán O'hUiginn, 8 Cypress Rd. Mt.
Merrion, Co. Dublin.

Italujo : U.E.C.I., Viale dei Mille 37, Milano, pk. 3/7791
C. C. Ferrari, 1100 lire.

Japanujo : F-ino D-ro Ĉisato Jamagata, 2-5 Otaki-Cho,
Yokosuka, 600 Yen.

Jugoslavio : Resp. Patro Lovro Kiš o.f.m. M. Tita 7,
Karlovac.

Kanado : S-ro C. R. MacDonald, 9445 Millen Avenue,
Montreal 12, P.Q., 2,— dol.

Nederlando : Kasisto Nederlanda Katoliko, Nieuwstr. 28,
Boskoop, p.k. 121449, f 6,—.

Nov-Zelando : D-ro J. Hamvai, 33 Arran St. Avondale,
Auckland, 12 ŝil.

Polujo : S-ro Antono Zoglowek, Roza Wielka, pow. Walcz,
130 zlot.

Portugalujo : S-ro Alfredo L. Sales, Bairro Olhavas,
Prédio Nunes, Leiria, 48 esk.

Svisujo : S-ro Paul Scherer, Riffigstr. 60, Emmenbrucke,
fr. 7,—.

Urugvajo : D-ro R. Zeballos Morales, Fray Marcos (Flor.).

Usono : S-ino Wm. Mc-Grogan, 2109 Parkwood Drive,
N.W. Warren, Ohio. U.S.A., 2,— dol.

KRISTANA ESPERANTISTA LIGO INTERNACIA

K.E.L.I. estas internacia ligo de evangeliistoj
el ĉiuj mondpartoj. Ĝia celo estas duflanka: unue, ĝi volas
krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj
eklezioj; due, ĝi volas inter esperantistoj diskonigi la
Evangelion pri Jesuo Kristo.

Por atingi tiujn celojn la ligo eldonas organon DIA
REGNO, kiun ĉiu membro ricevas. Ĝi aperas ĉiumonate.

Krome K.E.L.I. klopodas disvastigi sian mesaĝon per
propagando, reto de landaj sekcioj, landaj reprezentantoj
kaj misia agado.

Ĉiujare, prefere tuj antaŭ U.K., K.E.L.I. organizas
kongreson de evangeliistoj.

Centra oficejo ĉe la sekretariino, Bennekomseweg 20,
Ede (Gld.), Nederlando.

Membrokotizo estas 9 svedaj kronoj jare.

Abonprezo de la organo DIA REGNO estas 9 svedaj
kronoj jare.

Estraro :

Prezidanto: H. A. de Hoog, Archimedesweg 68, Amsterdam,
Nederlando.

Sekretariino: F-ino T. Putto, Bennekomseweg 20, Ede
(Gld.), Nederlando.

Kasisto: Ingvar Lagerström, Kungsgatan 33, Alingsås,
Svedujo.

Anoj : Erik Carlén, Svedujo; D. de Boer, Nederlando; S-ino Anna Sandgren-Alamo, Svedujo; Profesoro W. J. Downes, Britujo; A. Jensen, Danlando; Pastoro T. Ilmari Haapalainen, Finnlando; J. Argenta, Francujo; Erich Quentin, Germanujo; F. Liechti, Svislando; Profesoro Edward C. Hobbs, Usono.

Finredaktoro de "Dia Regno" : C. P. Brakké, Karel Doormanlaan 24, Uithoorn, Nederlando.

Administracio de "Dia Regno" : Druivenstraat 32, Den Haag, Nederlando.

Landaj sekretarioj kaj reprezentantoj :

Belgujo : S-ino S. Fichet-Jacquet, Rue Jules Destrée 104, Ransart.

Brazilo : C. Gomes de Carvalho, Strato Jesuino Arruda 707, São Paulo.

Britujo : F. Douglas Murphy, 7 Constable Road, Ipswich.

Danlando : A. Jensen, Skjalm Hvidesgade 16, Kopenhago V.

Finnlando : Pastoro T. Ilmari Haapalainen, Mekrijärvi, Ilomantsi.

Francujo : H. Dabezies, Avenue Debidour 2, Paris 19.

Germanujo : Erich Quentin, (23) Delmenhorst, Schützenhofstr. 4.

Italujo : Federico Balmas, Via Groscavallo 7, Torino.

Japanujo : Ueda Masao, Kokuryo-Tyo, 304 Maebasi-si.

Jugoslavujo : F-ino Mira Lovrec, Radiceva 30/prizemno, Zagreb.

Kanado : F. Enskaitis, 308 Herkimer St., Hamilton (Ont.).

Nederlando : D. de Boer, Druivenstraat 32, Den Haag.

Norvegujo : Vidar Vik, St. Olavsgt 29, Oslo.

Sud-Afriko : H. de Jong, 37 de Waal Drive, Estcourt, Natal.

Svedujo : K. O. Sandgren, Box 87, Östansjö.

Svislando : M. Moreillon, Rue du Beulet 6, Genève.

Usono : Edwin C. Harler Jr, 47 Hardy Road, West Levittown, Pa.

KVAKERA ESPERANTISTA SOCIETO

(Fondita en 1921)

Celo : Interesi membrojn de la Societo de Amikoj pri Esperanto kaj interesi Esperantistojn pri la Societo de Amikoj.

La Societo de Amikoj (aŭ Kvakeroj) religia grupo fondita meze de la 17a jarcento, kiel protesto kontraŭ la formalismo, ne havas konsekritajn pastrojn, ĉar iu ajn ano de la Societo povas servi kiel pastro.

La Amikoj ne opinias, ke ili solaj posedas la veron, sed volas kunligi kun la idealo de amo al Dio, amon al siaj kunuloj kaj al ĉiuj ajn homoj.

Ili opinias, ke io el Dio estas en ĉiu homo sen distingo de raso, religio, nacio, koloro aŭ klaso. Iliaj Diservoj estas sur silento por meditado kaj komunikiĝo kun Dio.

Ili volas vivi kaj labori kun ĉiuj homoj de bonvolo inspiritaj de altaj idealoj, kiaj ajn iliaj konceptoj, filozofioj aŭ religioj.

Membraro : Tiuj, kiuj akceptas la celon de K.E.S., t.e., kvakeroj, Interesatoj kaj Abonantoj, kaj pagas minimuman

Membro-kotizon de 7/6 ŝilingoj, (15 steloj aŭ egalvalora sumo).

"Kvakera Esperantisto", kvaronjara bulteno, sendata al ĉiu membro.

Estraro : (Britujo)

Sekr. : Jessie Saunders, Avenue House, Cotham Park North, Bristol 6.

Help-sekr. : Guy B. Tordoff, 82 Pendennis Park, Bristol 4.

Kasisto : Anthony H. Cadbury, 383 Cutler Heights Lane, Bradford, 4, Yorks.

Redakcio : J. Saunders kaj G. B. Tordoff.

Eldonejo : Soc. de Gefratoj, Bromdon Bridgnorth, Salop.

Reprezentantoj :

Anglujo : Ann Kinghorn, 20 Salmon Street, S. Shields, Durham.

Bristola Regiono : Guy B. Tordoff, 82 Pendennis Park, Bristol 4.

Wolverhampton-Regiono : Jean M. F. Marshall, The Woodlands, 434 Penn Rd., Penn.

Aŭstralio : D-ro F. J. Williams, 40 Evelina Road, Toorak, Victoria.

Belgujo : L. kaj R. Mathieu-Plumhans, Voisinage André Dumont 13, Ougree, Liege.

Danlando : Karen Bjørnsby, Hartmannsvej 23, Hellerup.

Francujo : Norda : Jacques Martin 1/2 Rue du Professeur, Lamaze, Lille.

Suda : K. G. Perra, 8 Rue St. Charles, Lyon 3e, Rhône.

Germanujo Okcidenta : Kurt H. Schmidt, Goethe Str. 8, Sand/Kassel 7.

Irlando : Ivor Williams, Friends' Institute, 47 Frederick Street, Belfast 1.

Nederlando : C. M. Burger, Prinses Marijkelaan 14/1, Zeist.

Svedujo : K. F. Karlsson, Lidagatan 5, Bramhult.

Svislando : Claude Gacond, La Sagne. Edmond Privat, Neuchatel, Rue de l'Evole 3.

Cetera Eŭropo : Alfred G. Tucker, Birchcroft, Pilgrims Way Canterbury, Anglujo.

Usono : Donald R. Broadribb, 5615 Woodlaan Ave., Chicago 37.

FAKAJ KAJ

SPECIALIGITAJ ORGANIZAĴOJ !

Instigu viajn membrojn fariĝi individuaj membroj de U.E.A., por ke ili estu daŭre informataj ankaŭ pri la ĝenerala tutmonda Esperanto-Movado !

Neneŭtrala Asocio Sendependa

SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA (S.A.T.)

Sidejo : 67 avenue Gambetta, PARIS-20. Tel. PYR. 87-05.
Poŝteka konto : 1234-22 Paris.

S.A.T. estis fondita en 1921 en Praha.

Ĝi eldonas monatan organon, **Sennaciulo**, kaj jarkajeron de **Sennacieca Revuo** (socipolitika, literatura, ekonomia, ktp).

Ĝi organizas ĉiujare Kongreson, por trakti organizajn problemojn, aŭdigi prelegojn kaj praktiki la lingvon. La lastaj okazis en Dortmund, Germanujo (1959) kaj Aarhus, Danlando (1960). La venonta kongreso, la 34-a, okazos en Gent, Belgujo.

La Asocio estas gvidata de sesmembra Plenum-Komitato, kiu prezentas siajn raportojn al la jara kongreso.

Fondinto de la Asocio estas **E. Lanti**, kiu mortis en januaro 1947, en Meksiko.

Lernejoj !

Partoprenu kun viaj klasoj en la lernigaj kaj ĉarmaj rondoj

"*Grainoj en vento*"

Unikaj en la mondo !

(Vidu dorsflanke)

SPECIALAJ KULTURAJ AKTIVECOJ

"GRAJNOJ EN VENTO"

La Tutmondaj Interlernejaj Rondo

(fonditaj en 1956)

- "Grajnoj en Vento" (VEV) estas lerneja organizo superpolitika, superrasa, superreligia. La celo de GEV estas :
- krei reton de infanaj rondoj sur la tuta terglobo;
 - pruvi la taŭgecon de Esperanto por interrilatoj de tutmondaj gelernantoj;
 - helpi al klopodoj enkonduki Esperanton en la lernejojn;
 - labori kun la infanoj por la internacia kunlaboro.

Rondo estas aro de 8—12 klasoj aŭ grupoj. Ĉiu rondo eldonas 3-foje jare, nome en marto, junio kaj novembro, komunan gazeton kun verkoj de la gelernantoj. Estas starigitaj rondoj de 4—8 jaraj infanoj, rondoj de 8—15 jaraj geknaboj, rondoj de 15—20 jaraj junuloj.

La verkoj estas : tekstoj pri reala vivo en la hejmo, lernejo, vilaĝo, urbo, lando, pri kutimoj, ludoj, festoj, ĝojoj kaj malfeliĉoj; desegnaĵoj, bildoj, fotoj, prospektoj, sekigitaj floroj, ktp.

La formato de la folioj estas ĉiam 21 x 29,7 centimetroj. Ĉiu kunlaboranta klaso aŭ grupo sendas al la rondgvidanto po 20 ekzempleroj por ĉiu eldono de la gazeto.

Reprezentantoj kaj rondgvidantoj :

- S-ro Marcel Erbeta, rue des Pins 66, **Bienne 7**, Svislando.
S-ro Zvonko Rehorić, Srebrnjak 47, **Zagreb III**, Jugoslavio.
S-ro Henri Coulon, Ecole du Petit Chinois, **Montbéliard**, Doubs, Francujo.
S-ino Hilda Melton, Great Barr Comprehensive School, **Birmingham 22a**, Anglujo.
S-ino Amalija Torelli, Osnovna škola, Prezihova ulica 8, **Ljubljana**, Jugoslavio.
S-ro Peter Anso, Kastani 24-1, **Tartu**, Estonia SSR.
S-ino B. M. Delgado, 58, Albert Road, **Tamworth**, Staffs, Anglujo (speciala rondo por etuloj 4-8-jaraj).
S-ro Hristo Manolov, gimnazio, **Polski Trambeš**, Tirnovsko, Bulgarujo.

Konsilantoj :

- S-ro Prof. Francisko Novljan, Badalićeva 9a, **Zagreb**, Jugoslavio.
S-ro D-ro Andreo Albault, redaktoro de Internacia Pedagogia Revuo, 8, Avenue Et. Billières, **Toulouse**, Francujo.
S-ro D-ro Jozsef Kondor, gimnazio, **Kastl** bei Amberg, Germanujo.

Informojn sendas la rondgvidantoj kaj la Centra Oficejo en Svislando. Oni aldonu internacian respondkuponon.

Financa kontribuo por helpi al plua disvastiĝado de la rondo estas bonvena. Oni sendu ĝin per internacia poŝtmandato al poŝtĉekkonto : "Grajnoj en Vento", Marcel Erbeta, IVa 9485, rue des Pins 66, Bienne-Biel, Svislando/Suisse.

MAGNETOFONA SERVO DE U.E.A.

(fondita en 1957)

Komisiito :

Rüdiger Eichholz, ĉe Esperanto Press, Oakville, Ontario, Kanado.

Taskoj :

- Kolektado de sonbende registritaj prelegoj, radio-dissendoj, kantoj, kursoj, teatraĵoj kaj ĝenerale interesaj sondokumentoj en aŭ pri Esperanto.
- Vendado de kopioj de tiuj programoj.

Metodo.

Ĉiu esperantisto estas petata, kontribui al la pliriĉigo de la jam ekzistanta kolekto. La surbendigoj devas esti neŭtralecaj laŭ la UEA-statuto, lingve senriproĉaj kaj laŭ la teknika vidpunkto de la registro sufiĉe bonkvalitaj. Ĉiu sendinto, kies programo estas akceptita, rajtas ricevi senkoste programojn ĝis la duobla tempodaŭro de la akceptitaj surbendigoj. Sed li devas eventuale pagi por la sonbendmaterialo, se la ensendita sonbendo ne estas sufiĉe longa por surbendigi ĉiujn deziratajn programojn.

Por ke la Magnetofona Servo povu subteni sin mem, estas necese, ke kluboj aŭ individuoj aĉetu kopiojn de la dezirataj programoj. Nur tiel la Magnetofona Servo povas akiri la necesan monon, por aĉeti la sonbendmaterialon de la kolekto kaj por kovri la afrank- kaj administrajn elspezojn. La Magnetofona Servo liveras kopiojn de ĉiuj dezirataj programoj laŭ jenaj kondiĉoj :

Oni pagu rekte al la komisiito aŭ al lia germana poŝt-
 ĉekkonto (Hannover 1173 68) 1,00 dolaron por 30 minuta
 kopio (por pli aŭ malpli longa programo proporcie pli
 altan aŭ malaltan sumon). Tiu prezo inkluzivas jam la
 afrankkostojn (por registrata ekspedo aldonu 0,20 \$).
 Krome estas liverenda aŭ pagenda la sonbendmaterialo,
 sur kiu la kopio estu farota. La sekvanta tabelo indikas
 la prezojn kaj la daŭron de la surbendigeblaj programoj
 sur diversspecaj sonbendoj. Ankaŭ la uzitaj sonbendoj
 estas sufiĉe bonkvalitaj, sed ili estas sen propraj skatoloj
 kaj povas esti kungluitaj. La komisiito ne vendas son-
 bendojn sen programoj surbendigitaj.

Surbendigebla programo (en minutoj), se la kopioj estas
 farataj

Longeco de haveblaj sonbendoj :	a) per dutraka maŝino kaj jenaj rapidecoj :			Prezoj de la sonbendoj novaj uzitaj	
	19cm/sek	9,5cm/sek	4,75cm/sek		
540 metroj = 1800 futoj	90 min.	180 min.	360 min.	4,90\$	3,10\$
360 metroj = 1200 futoj	60	120	240	2,90\$	1,90\$
180 metroj = 600 futoj	30	60	120	1,85\$	1,10\$
45 metroj = 150 futoj	7	15	30	0,70\$	0,40\$
Longeco de haveblaj sonbendoj :	b) per kvartraka maŝino kaj jenaj rapidecoj :			Prezoj de la sonbendoj novaj uzitaj	
	19cm/sek	9,5cm/sek	4,75cm/sek		
540 metroj = 1800 futoj	180 min.	360 min.	720 min.	4,90\$	3,10\$
360 metroj = 1200 futoj	120	240	480	2,90\$	1,90\$
180 metroj = 600 futoj	60	120	240	1,85\$	1,10\$
45 metroj = 150 futoj	15	30	60	0,70\$	0,40\$

Por malaltigi la kopikostojn multaj programoj estas
 kunkopiataj por akiri pli facile kopiigeblajn duhorajn
 programojn. Kopioj de tiuj programaroj kostas anstataŭ
 4,00 \$ nur 3,00 \$. Ĉiu programo aperas nur en unu pro-
 gramaro.

LISTO DE LA PROGRAMAROJ

- Grésillon 1957 : (tiu programaro enhavas programojn)
1, 4, 5, kaj partojn el 2 kaj 3.
- Poul Thorsen (Paroladoj kaj voĉlegoj) : 7, 8, 22, 66.
- Internacia paletro : 15, 24, 67, 70, komenco de 14.
- Paco, Svislando kaj Zamenhof : 17, 19, 20, 21, 65, 52.
- Instruista programaro : 62, 64, 49, 12
- 43-a U.K. : Partoj el inaŭguro kaj fermo : 25a + b, 33.
- 43-a UK : La unua sekcio kaj Akademio : 27, 28.
- 43-a UK : Festprogramoj : 26, 29.
- 43-a UK : ISU 1958 : 34, 36, 37.
- 43-a UK : ISU 1958 : 41, 38, 40 (komenco).
- Radio Zagreb : Kongresraportoj : 46, 47.
- Radio Zagreb : Raportaĵoj : 48, 51, 53, 50.
- Radio Zagreb : Geografiaj kaj distraj programoj :
54, 55, 56, 57, 58, 59, 60, 61.
- 44-a UK : Omaĝe al Zamenhof : 72, 73, 74.
- 44-a UK : 75, 76, 77.
- 44-a UK : ISU-prelegoj : 80, 79, 78 (partoj).
- Edwin de Kock : 82 (+ kantoj el Pollando - el 44).
- Vojaĝimpresoj : 68, 13, 16.
- Angla programaro : 84, 85, 10, 9, 45.
- Eizo Itoo : Pri mondvojaĝo kaj Japanujo : 86.
- 45-a UK : Inaŭguro : 92.
- 45-a UK : 1a Ĝenerala Kunveno de UEA : 93.
- 45-a UK : Esperanto en la lernejoj : 95.
- 45-a UK : 2a sekcio (partoj) kaj Oratora Konkurso :
96, 97.
- 45-a UK : Muzika Vespero : 98, 89.
- 45-a UK : ISU-prelegoj : 102, 108.
- 45-a UK : ISU-prelegoj : 103, 104, 105.
- Islanda programo : 87 (3 hora programo. Kopikosto
4.50\$).

LISTO DE LA HAVEBLAJ SONBENDOJ (20-11-1960)

La nombroj post la priskribo de la programoj indikas
 la daŭron en minutoj, la nombroj inter krampoj la pro-
 gramaron en kiu la koncerna programo troviĝas.

- Mag. W. Auld : 'La nuntempa Esperanto-
literaturo'. (Surbendigita en Kastelo Grésillon,
somero 1957) 30 (1)
- Prof. I. Lapenna : 'La laboroj de UNESKO

- por interkonigo de popoloj'. (Surbendigita en Kastelo Grésillon, somero 1957) 45
3. Prof. G. Waringhien: 'Pri la Loire-Civilizacio'. (Kastelo Grésillon, somero 1957) 30
 4. Ing. R. Watier: 'Modernaj teĥnikaj revolucioj: Atomenergio kaj aŭtomatigo'. (Surbendigita en Kastelo Grésillon, somero 1957) 40 (1)
 5. D-ro A. Albault: 'La problemo de la malsato en la mondo'. (Surbendigita en Kastelo Grésillon, somero 1957) 40 (1)
 6. 'Unter dem grünen Stern'. (Germanlingva elsendo de la radiostacio NWDR Hannover dum aprilo 1957 memore al la 40a datreveno de la morto de Zamenhof. (Surbendigita de aŭskultinto) 30
 7. Poul Thorsen: 'Tri nobelpremiitoj en dana literaturo'. (Karl Gjellerup - Henrik Pontopidan - Johannes V. Jensen). Prelego dum Somera Universitato, Kopenhago 1956 45 (2)
 8. Poul Thorsen: '12 poemoj el Rozoj kaj Urtikoj'. Voĉlegataj de la aŭtoro kun enkonduko de Kirsten Zacho 30
 9. Diskutoj kaj voĉdonado pri Esperanto dum la ferma kunsido de la VIII-a Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Montevideo. Paroladoj en hispana, franca kaj angla lingvoj 10 (19)
 10. Diskutoj pri Esperanto en la Nov-Zelanda parlamento (1958). Surbendigita de radio-elsendo kun anglalingva komentario de David MacGill 15 (19)
 11. La urbestro de Mainz invitas esperantistojn al la 43-a U.K. 3
 12. J. H. Sullivan: 'La Esperanto-Movado kaj la Junularo'. (Surbendigita dum la jarkunveno 1958 de la Society of British Esperantist Teachers) 30 (5)
 13. F. Franceschi: 'Personaj impresoj pri Bulgarujo'. El radioelsendo de radio Sofia, 1958 . 10 (18)
 14. C. W. M. Baans: 'La vivo de Ĉajkovski kun muziko de tiu ĉi komponisto'. (Surbendigita en kunveno de Nederlanda Esp. Asocio 'La Estonto Estas Nia', marto 1958) 100

15. E. Andersson: 'Vermlando de Selma Lagerlöf kaj la fabelo de Gösta Berling'. 33 (3)
 16. E. Andersson kaj B. S. Ågren: 'Impresoj pri Italujo'. (Por radioelsendo de radio-Romo) . 25 (18)
 17. E. J. Weber: 'La internacia paco kaj nia pensmaniero'. (Parolado ĉe la 23-a kongreso de Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, decembro 1957) 40 (4)
 18. E. J. Weber: 'Pledo por parola uzo de Esperanto'. 10
 19. Prof. E. Privat: 'Pacaj metodoj de interŝtata kunvivado'. (4 radioprelegetoj de la Svisa Radio surbendigitaj por la Magnetofona Servo) 20 (4)
 20. D-ro A. Baur: 'La kvara nacia lingvo de Svislando'. (La Romanĉa lingvo) (Surbendigita de la Svisa Radio por la Magnetofona Servo) . 15 (4)
 21. D-ro A. Baur: 'La persono de Heinrich Pestalozzi'. (Surbendigo de la Svisa Radio) . . 5 (4)
 22. Poul Thorsen: 'Knud Rasmussen kaj la eskima poezio'. (Dissendata de la dana radio) . 20 (2)
 23. Mark Starr: 'Komparo de Laborist-Movado en Usono kaj Eŭropo'. (Parolado dum SAT-kongreso 1958 en Helsinki) 50
 24. G. Nörsgaard: 'La lando kie la reĝo estas muzik-direktisto'. (Pri dana muziko kun ekzemploj) 20 (3)
- 43-a Universala Kongreso de Esperanto**
25. Solena inaŭguro. (Paroladoj de prof. Canuto, prof. Privat, Ing. L. Zamenhof, d-ro Sehl, prof. Delekat, kaj de la oficialaj reprezentantoj de la registaroj. Festparolado de prof. Lapenna) 94 (6)
 - 25a. El sonbendo 25: Nur la parolado de prof. Privat kaj la salutvortoj de Ing. L. Zamenhof 15 (6)
 - 25b. El sonbendo 25: Nur la festparolado de prof. Lapenna 30 (6)
 26. Jubilea Festprogramo okaze de la 50-jara Jubileo de la Fondiĝo de UEA. (Parolis prof. Privat, Hans Jakob, H. W. Holmes, Tibor Sekelj, prof. Lapenna) 74 (8)
 27. La laboro en la Unua Sekcio. (Paroladoj kaj diskutoj pri la temo 'Reciproka Aprezado de la Okcidenta kaj Orienta Kulturaj Valoroj.

La Rolo de la Internacia Lingvo'	92 (7)
28. Publika Kunveno de la Akademio de Esperanto kun enkonduka raporto de la prezidanto de la Akademio pri la temo 'La gramatika karaktero de la radikoj en Esperanto'	25 (7)
29. Festo okaze de la duobla jubileo de prof. Lapenna. (Parolis: Prof. Canuto, s-ro Holmes, f-ino Vermaas, prof. Lapenna)	45 (8)
30. Fakkunveno de Internacia Federacio Esperantista Fervojista. (S-ro Winkelhaus laŭtlegas tradukitan prelegon de la germana fervoja prezidanto s-ro Geitmann: 'Raciigado-Moder-nigado-Aŭtomatigado ĉe la Germana Federacia Fervojoj'.)	20
31. Fakkunveno de Internacia Geografika Asocio. (Parolis Tibor Sekelj kaj W. v. d. Ley)	20
32. Fakkunveno de Tutmonda Esperantista Journalista Asocio. Raportoj pri la ĝisnuna agado de la asocio.	15
33. Solena Fermo. (Parolis i.a. s-ro Stein, prof. Canuto, prof. Lapenna, prof. Waringhien, s-roj Thorsen, Fighiera, Rajski)	80 (6)

Internacia Somera Universitato 1958

34. Prof. Lapenna: 'La Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj.' (Krome inaŭguro de ISU per prof. Sirk)	40 (9)
35. Prof. E. Privat: 'William Penn, Fondinto de Pensilvanio. Proponinto de Eŭropa Parlamento	55
36. Ivo Rotkvič: 'Traduki Artverkon, Ĉu Utopio?'	43 (9)
37. Prof. Hideo Yagi: 'Domaĝo de la Atombomboj en Postaj Jaroj.'	30 (9)
38. Prof. Gaston Waringhien: 'Henriko Heine'	60 (10)
39. Prof. G. Canuto: 'La Stratacidentoj laŭ Medicina Vidpunkto.'	54
40. D-ro Manfred Sader: 'Nuntempaj problemoj de Psikologia Diagnostiko.'	30
41. Prof. W. E. Collinson: 'La Etimologio en Naciaj kaj Internaciaj Lingvoj.'	50 (10)
42. Prof. H. Sirk: 'Ĉu ekzistas Atomoj da Energio?'	65
43. Resumo de la kongresaj aranĝoj kaj de la	

ISU-prelegoj	90
44. Invito al la 44-a UK en Varsovio. (Intervjuo kun la Prezidanto de LKK - Impresoj pri Varsovio de la KKS - Rememoroj pri la avo de Ing. Z. Zamenhof - Invito al Varsovio de Urbestro - Polaj popolkantoj)	24
45. David MacGill: 'Ludovic Zamenhof' (Angla-lingva biografia programo kun diversaj parolantoj kaj muziko. Rekomendinda por solenaĵo kun neesperantistoj)	60 (19)
46. La 42-a UK en Marseille, 1957 (Raportaĵo de Radio Zagreb)	90 (11)
47. La 10-a IFEF-Kongreso en Aarhus, 1958 (Raportaĵo de Radio Zagreb)	30 (11)
48. La 43-a UK en Mainz, 1958 (Raportaĵo de Radio Zagreb)	60 (12)
49. Esperanto-instruado en jugoslavia lernejo (Raportaĵo de Radio Zagreb)	15 (5)
50. La unua esperantista laborbrigado. (Raportaĵo de Radio Zagreb)	20 (12)
51. Aŭskultu niajn gejunulojn! (Esperantistaj junulargvidantoj raportas; Raportaĵo de Radio Zagreb)	15 (12)
52. Ivo Rotkvič: 'Mortotago de Zamenhof'. (Elsendo de Radio Zagreb)	20 (4)
53. Ivo Rotkvič: 'Esperantista Geografio'	15 (12)
54. Joso Ŝlat: 'Bosnio kaj Hercegovino' (Raportaĵo de Radio Zagreb pri la jugoslavia respubliko)	15 (13)
55. Joso Ŝlat: 'La respubliko Slovenio'. (Raportaĵo de Radio Zagreb)	15 (13)
56. Joso Ŝlat: 'La popola respubliko Makedonujo' (Raportaĵo de Radio Zagreb)	15 (13)
57. Mirko Mamosiĉ: 'Vojvodino' (Raportaĵo de Radio Zagreb pri la nordorienta parto de Jugoslavio)	15 (13)
58. Branislav Nušić: 'La unua amo' (Humoraĵo, prezentita de Radio Zagreb)	15 (13)
59. Petar Ĝunio: 'La malbone edukita papago'. (Humoraĵo prezentita de Radio Zagreb)	20 (13)
60. Petar Ĝunio: 'La fantomo'. (Humoraĵo prezentita de Radio Zagreb)	15 (13)
61. Paden Juraj: 'Diabloj plugis la kampon'.	

(Radiodramo de Radio Zagreb)	15 (13)
62. K. I. Stephenson: 'Esperanto - Elirpunkto por lingva vojaĝo.' (Parolado dum la jarkunveno de la Society of British Esperantist Teachers, januaro 1959)	25 (5)
63. Cia Delgado: "11-jara knabino raportas pri la 3-a Infana Kongreseto en Mainz"	15
64. O. Melton: 'La ĉiugrada lernejo'. (Parolado pri nova lerneja sistemo 'Comprehensive School', kiu evitas apartigon de la infanoj)	45 (5)
65. Prof. Ivo Lapenna: 'La grandeco de D-ro L. L. Zamenhof'. (Teksto en 'Esperanto' n-ro 649, paĝo 218)	20 (4)
66. Poul Thorsen: 'Kumbel - la kosmopolita humoristo'. (Prelego en la dana ŝtata radio)	20 (2)
67. David MacGill: 'Voĉoj el la pasinto'. (Babilado pri malnova muzika skatolo)	15 (3)
68. Bertram Potts: 'Nia mondvojaĝo, Novzelando kaj la Maorioj'. (Parolado antaŭ la Esperanto-Klubo de Ĉikago, 1957)	85 (18)
69. W. Brandenburg: 'Intervjuo kun partoprenantoj kaj gvidantoj de la 5-a Geknaba Kongreseto de SAT'. (Dortmund, 1959)	30
70. La Antverpena Esperanto Grupo prezentas: 'La embusko' (Komedio)	45 (3)
71. La malfermo de la Esperanto-Kulturdomo en Kanado. (Parolado de s-ro Eichholz, salutvortoj de prof. Lapenna, televida intervjuo de ges-roj Eichholz)	25

44-a Universala Kongreso de Esperanto

72. Solena malfermo 1-a parto (Paroladoj de s-ro A. Rajski, de la pola vic-ĉefministro Piotr Jaroszewicz, de prof. G. Canuto)	38 (14)
73. Solena malfermo, 2-a parto: Festparolado de s-ro Ivo Rotkvic	40 (14)
74. Festo omaĝe al Zamenhof. (Paroladoj de prof. G. Canuto, de la ambasadoro de Vietnamio en Moskvo, kaj de Andreo Cseh; recitadoj de Hanja Zamenhof kaj J. Baghy)	45 (14)
75. Oratora Konkurso: (Carlo Minnaja, Humphrey Tonkin, Stanislaw Swistak)	46 (15)
76. La Bulgara Arta Teatro prezentas: 'Ĉasantoj	

de ofico', Komedio de Ivan Vazov	26 (15)
77. Prof. d-ro Paul Neergaard: 'La lukto kontraŭ la malsato - ĝia internacia organizado.' (ISU 1959)	45 (15)
78. Josip Vrančić: 'Estetika analizo de urbanismearkitekturaj karakterizoj de la urbo Dubrovnik'. (ISU 1959)	48 (16)
79. Marjorie Boulton: 'Joseph Conrad - polo kiu estis angla verkisto.' (ISU 1959)	54 (16)
80. Prof. d-ro Popoviĉ: 'Eblecoj kaj malfacilaĵoj por interplaneda vojaĝo.' (ISU 1959)	55 (16)
81. Solena Fermo de la Kongreso	25
82. Edwin de Kock: 'Kvin Elementoj kaj aliaj versaĵoj' (Poemaro, legata de la aŭtoro)	100 (17)
83. Prof. G. Waringhien: 'Honore al d-ro L. L. Zamenhof' (Prelego je la 15.12.1959 en la universitato de Parizo)	35
84. D-ro E. James Lieberman: 'Interview with John Lewine'. (Anglalingva intervjuo pri Esperanto, en kiu prezidinto de ELNA respondas ofte aŭditajn demandojn)	20 (19)
85. D-ro E. James Lieberman: 'L. L. Zamenhof: Dr. Esperanto'. (Anglalingva artikolo pri Zamenhof, kiu aperis en 'New England Journal of Medicine' n-ro 261, 1959, legata de la aŭtoro)	15 (19)
86. S-ro Eizo Itoo raportas pri sia mondvojaĝo kaj Japanujo. (Surbendigita en la Esperanto Domo, Oakville, Kanado, majo 1960)	120 (20)
87. Islanda programo preparita kaj surbendigita de la esperantista societo 'Aŭtoro' en Reykjavik, Islando. (Pri islanda historio, muziko kaj literaturo)	180 (28)
88. Du humoraj skizoj de David Mac Gill: 'La Muzika Profesoro', 'Ĉu vi povas kalkuli?' prezentitaj de la Esperanto Klubo de Trentham, Novzelando	25
89. 'La Realeco estis tute alia' - Teatraĵo prezentita de la Esp. Grupo 'La Verda Stelo', Antverpeno	30 (25)
90. M. Jaumotte: Festparolado dum la 6-a Benuksa Kongreso en Harlemono. (Majo 1959)	30

La 45-a Universala Kongreso de Esperanto

91. Invito al la 45-a Kongreso	30
92. Solena Inaŭguro	120 (21)
93. 1-a Ĝenerala Kunveno de UEA	120 (22)
94. 2-a Ĝenerala Kunveno de UEA (parte)	120
95. La laboro en la unua sekcio 'Esperanto en la Lernejoj'	135
96. La laboro en la dua sekcio: 'Kontribuo de Esperanto al la Granda Projekto de UNESCO 'Oriento-Okcidento'	85 (24)
97. Oratora Konkurso	60 (24)
98. Muzika Vespero en la Palaco de Belaj Artoj (Esperantaj kantoj)	85 (25)
99. Belga Vespero (Informoj pri Belgujo)	55
100. Fakkunveno de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista: Prelego de H. de Roover pri 'Internacia Katolika Laborista Junularmovado'	90
101. Lasta parto de komuna vizito al la 5-a Internacia Infana Kongreseto	23
102. Inaŭguro de 1-a ISU kaj prelego de s-ro C. Støp-Bowitz: 'La Eŭropa Angilo Tute ne Frajas!'	60 (26)
103. Prof. H. L. Elvin: 'La Angla Edukado, Kiel ĝi Estas Vidata de Eksterlandano'. (ISU 1960) (nur parte)	40 (27)
104. Prof. Ivo Lapenna: 'Internacijuraj Problemoj de Spacveturado' (ISU 1960) (nur parte)	40 (27)
105. Prof. Marcel Roost: 'Juraj Problemoj pri Atoma Energio' (ISU 1960) (parte)	38 (27)
106. Frank Merrick: 'Esperantaj kantoj kaj ilia komponado' (ISU 1960)	45
107. Lic. Tibor Sekelj: 'Jogo, Filozofio, Celo kaj Praktiko' (ISU 1960) (nur partoj)	30
108. Prof. W. E. Collison: 'Toponomio aŭ studo de loknomoj' (ISU 1960)	50 (26)
109. Solena Fermo de la 45-a UK	90
110. Vilma Eichholz: 'Kanadaj virinoj de la porpaca movado'. 'Voĉo de Virinoj' vokas vin.'	30

Specimena programo kun fragmentoj el ĉiuj 31 unuaj programoj estas havebla sur uzita sonbendo por nur \$ 3.00 dolaroj.

KORESPONDA SERVO MONDSKALA

Estas tre grave por la movado, ke ĉiu esperantisto praktiku la lingvon almenaŭ perletere. Tial K.S.M. celas havigi al siaj membroj korespondantojn laŭeble konformajn al iliaj deziroj. — Ĉiu korespondemulo rajtas senpage enskribiĝi **sed ne ricevos rektan respondon**, ĉar la Koresponda Servo disponas pri nenia financa subvencio. Ĉiu persono, kiu deziras rekte ricevi adreson de K.S.M. devos aldoni **internacian respondkuponon** (aŭ samvalorajn **francajn** poŝtmarkojn) por ĉiu petata korespondanto. (vidu ĉi-sube modelon de aliĝilo al K.S.M.)

Ĉiumonate aperas en la revuo "Esperanto" mallonga raporto pri la stato de K.S.M., se necese kun kelkaj konsiloj rilate elekton de korespondantoj el landoj, el kiuj alvenis la plej granda nombro de adresoj. Ni do petas vin atente tralegi tiun ĉiumonatan rubrikon.

Adreso de la Koresponda Servo de U.E.A.: F-ino C. Hueter 12, rue des Jacobins, Clermont-Fd (Pdd), Francujo.

Modelo de Aliĝilo

Nomo kaj antaŭnomo: (bonvolu skribi preslitere)

Kompleta adreso: (bonvolu skribi preslitere)

aĝo: profesio:

Ĉu edz(in)iĝinta aŭ ne:

Deziras korespondi kun kiom da gekorespondantoj:

El kiuj landoj:

Pri kiaj temoj:

La subskribint(in)o certigas respondon al ĉiuj korespondpetoj, transdonitaj de K.S.M. laŭ ĉi-supraj informoj. Nombro de enmetitaj respondkuponoj.

. Nombro de enmetitaj francaj poŝtmarkoj.

Subskribo:

ARANĜOJ ESPERANTISTAJ EN 1961

INTERNACIAJ KONGRESOJ

- 46-a Universala Kongreso . Harrogate, Britujo, 5-12/8
34-a SAT-Kongreso Gent, Belujo, 29/7 - 4/8
13-a I.F.E.F.-Kongreso Barcelona, Hispanujo, 6 - 11/5
17-a T.E.J.O.-Kongreso Wokingham, Britujo, 12 - 19/8
14-a K.E.L.I.-Kongreso Bishop's Stortford, Britujo,
29/7 - 5/8

Antaŭkongreso kaj Semi-
nario "Oriente-Okcidento" London, 2 - 4/8

LANDAJ KONGRESOJ

- Argentino Rosario, Pasko
Aŭstralio Sydney 1-7/1'62
Benelukso Namuro, Pentekosto
Brazilo Porto Alegre, 8-15/10
Britujo Bournemouth, Pasko
Danlando Fredericia, Pentekosto
Francujo Epernay, Pentekosto
Germanujo Bad Hersfeld, Pentekosto
Hispanujo Palma de Mallorca, 14-19/5
Israelo Tel-Aviv, 2-3/4
Japanujo Toyama, 17-20/8
Madagaskaro Tananarive, junio
Norvegujo Oslo, Pentekosto
Svedujo Linköping, Pentekosto
Svislando Zürich, 11-12/3
Usono Seattle, 7-10/7

ALIAJ ARANĜOJ

- Britujo Seminario por Ĉe-metodaj
instruistoj de Esperanto,
Harrogate, 6-11/8

3-a Geografia Semajno, Not-
tingham, 12-19/8

Ĉeĥoslovakio Somera Esperanto-Kolegio,
Trenč. Teplice, 13-26/8

- Danlando Internaciaj Feriaj Kursoj,
Helsingør 23-30/7, Vejle
15-22/10

Francujo Kongreso de G.E.E., Arras,
25-30/3

Esperanto-Kultur-Domo Gré-
sillon, Baugé.
Diversaj aranĝoj de 20-6 ĝis
12-9. Vidu reklamon en tiu
ĉi Jarlibro

Greklando Internaciaj Ferio-Semajnoj,
Thessaloniki, 14-28/8

Nederlando Jubilea Kongreso de F.L.E.,
Amsterdam, Pentekosto

9-a Internacia Esperanto-
Ferio-Semajno, Krommenie,
13-21/8

Norvegujo Norvega Feria Semajno,
Leangkollen, 6-12/8

Pollando Internacia Somera Junulara
Esperanto-Renkonto,
Gdansk, 2-16/7

Svislando Feriaj Kultur-Semajnoj
Esperanto kaj Geonismo,
Münchenwiler 6-20/8

3-a Internacia Feriosemajno,
Aarau, 11-17/9

EN ĈIU KONGRESO KAJ ALIA
RENKONTIĜO ARANĜU BELAN

LIBROSTANDON

LA LIBROSERVO DE U.E.A. LIVERAS ĈION
KION VI BEZONAS !

STAFETO

Eld. J. Régulo

1961-1962 : PROZO-JARO !

STAFETO progresas laŭ la evoluskemo de la gentaj lingvoj : unue ĉefe poezio, poste pli intense teatro, kaj nun prozo. Sekve dum 1961-1962 STAFETO, sen neglekto de la alia literaturo, ĉefe emfazos la prozan branĉon jene :

Stellan Engholm

HOMOJ SUR LA TERO

2a eldono finreviziita de la aŭtoro antaŭ lia morto, kun enkonduka eseo de **Ferenc Szilágyi** pri la vivo kaj signifo de S. Engholm. ĉ. 250-paĝa volumo.

Raymond Schwartz

KIEL AKVO DE L'RIVERO

Originala romano; grava, pli ol 400-paĝa volumo

ORIGINALA NOVELARO

Redakto de **Reto Rossetti** kaj **Ferenc Szilágyi**, kun enkonduka eseo de **Ivo Rotkvić** pri la Esperanta novelistiko, ĉ. 350-paĝa volumo.

LA ZAMENHOFA ESPERANTO

(Simpozio pri -ata/-ita)

ĉ. 250-paĝa volumo kun kontribuajoj de elstaraj esperantologoj zamenhofanoj (**De Hoog, Kalocsay, La Colla, Lapenna, Mikami, Pumpr, Schwartz, Sonnenfeld, Waringhien** ktp)

Marjorie Boulton

ZAMENHOF

Ĝisdatigita biografio de la iniciatinto de la Lingvo internacia, originale verkita en Esperanto, bele ilustrita, ĉ. 250-paĝa volumo

W. E. Collinson

CIVILIZO KAJ LINGVO

Originala traktaĵo pri la interefikoj de civilizo kaj lingvo, surbaze de Esperanto. ĉ. 300-paĝa volumo.

Poste sekvos volumoj de **Francis. Neergaard, Régulo, Ribillard, Rotkvić** ktp.

KUNHELPU PLUPORTI LA TORĈON !
ĈIUJN TITOLOJN LIVERAS LA LIBRO-SERVO DE U.E.A. !

STAFETO

Eld. J. Régulo

Famo ne flugas, se kaŭzo ne estas!
Sep titoloj de STAFETO jam elĉerpigis!

Nun disponeblaj titoloj:

Ch. Baudelaire: **La floroj de l' malbono**, trd. de **K. KALOCSAY** kaj **G. WARINGHIEN** 400 p.

J. D. APPLEBAUM: Jozefo. 120 paĝoj.

Esperanta Antologio. **Poemoj 1887-1957**. Redakto de **WILLIAM AULD** 648 p.

J. BAGHY: **Sonĝe sub pomarbo**. 232 p.

M. BOULTON: **Eroj kaj aliaj poemoj**. 368 p.

Sofoklo: **Reĝo Edipo kaj Antigona**. Traduko de **D. B. GREGOR**. 216 p.

M. Pagnol: **Topaze**; Ch. Vildrac: **La ŝipego "Tenacity"**. Trad. de **R. BERNARD**. 292 p.

W. Shakespeare: **Otelo**. Traduko de **RETO ROSSETTI**. 208 p.

Internacia Teatro (Vidu anoncon sur p. 100 de la 1960-Jarlibro). **Presata**.

P. NEERGAARD: **La vivo de la plantoj**. 128 paĝoj, ilustrita.

T. SEKELJ: **Nepalo malfermas la pordon**. 216 plus 10 paĝoj, ilustrita.

L. TELL: **La bela subtera mondo**. 96 plus 24 paĝoj, ilustrita.

B. RAGNARSSON: **Ŝtupoj sen nomo**. 128 paĝoj. Dekoracioj de **PICASSO**.

R. ROSSETTI: **Pinta kraĵono**. 136 paĝoj. Dekoracioj de **KLEE**.

E. URBANOVA: **Nur tri kolorojn**. 140 paĝoj. Dekoracioj de **OBERTHOR**.

J. FRANCIS: **Vitralo**. 136 paĝoj.

E. PRIVAT: **Junaĝa verkaro**. 144 paĝoj.

W. AULD: **Unufingraj melodioj**. 128 paĝoj. Dekoracioj de **YOUNG**.

Reeĥoj. Jugoslavia poemaro. - ĉ. 128 paĝoj (**Presata**).

E. DE KOCK: **Ombroj de la kvara dimensio**. ĉ. 140 paĝoj (**Presata**).

G. WARINGHIEN: **Lingvo kaj vivo. Esperantologiaj esoj**. 452 p.

EDITIONS FRANÇAISES D'ESPERANTO

11 rue Vergnes — MARMANDE — Francujo —
Telefono: 730.

Poŝtĉekkonto: Bordeaux 30-900.

Ĉiuj prezoj inkluzivas afrankon kaj estas indikitaj per STELOJ: 1 St = 0,25 Ned. Guld.

NI PAROLU EN ESPERANTO 2a eldono de ilustrita Kurso de Esperanto por franceparolantoj, en 12 lecionoj, de A. RIBOT; 160 paĝoj 12 × 16, kun trikolora kartona kovrilo: gramatiko, vortstudo, tradukekzercoj, legaĵoj, EF kaj FE leksikonoj 12 St.

KOREKTILOJ por la ekzercoj de la ĉi-supra libro 2 St.

DISKO mikrokanela 45 t/M, nerompebla, registrita de J. PEYRONNET kaj S. FLEGO. Tre utila por akiri perfektan prononcon de Esperanto 12 St.

FRANCA-ESPERANTA VORTARO verkita de R. LEGER kaj A. ALBAULT; 700-paĝa 12 × 16, fortika fleksebla bindaĵo, kun pluraj klarigaj tabeloj; nemalhavebla por la franceparolantoj, kiuj deziras akiri firman konon de la Internacia Lingvo 61 St.

LE DOCTEUR ESPERANTO verkita de M. ZIOŁKOWSKA. Vivo de D-ro ZAMENHOF, unuafoje eldonita en franca lingvo, okaze de l'centa datreveno de l'naskiĝo de la Aŭtoro de Esperanto. Dank'al la nombro de siaj detaloj, tiu libro estas bonega diskonigilo de Esperanto, uzebla kiel donaco. Devus troviĝi en ĉiu moderna biblioteko. Volumo 168-paĝa.
Eldono broŝurita 20 St.
Eldono bindita kun oraj surprisoj 41 St.

Al via mendo, bonvolu aldoni la indikitan sumon. La Asocioj kaj Grupoj rajtas ricevi la kutiman rabaton. Por ĉiu informpeto, unu internacia respondkupono estos bonvena.

